


LA NOV-JORKIA ESPERANTISTO

ISSN 2573-6108



Esperantumado en la Imperia Ŝtato

Volumo 2 Numero 2 Novembro 2018



Esperantistoj Reklamas Esperanton en Loka Kultura Foiro

Ken HYNSON, Esperanto-Societo de Sirakuso



Ken HYNSON, Zerbie HYNSON, kaj Annette BRASOR reklamas Esperanton dum la Kultura Foiro de Strato Westcott en Sirakuso (foto de Timoteo BORONCZYK).

Esperantistoj de la Esperanto-Societo de Sirakuso partoprenis en la Kultura Foiro de Strato Westcott la 23an de septembro. La foiro estas 27-jara tradicio en Sirakuso, kiu festas pri la diverseco de la loka kvartalo Westcott. Laŭtakse iom pli ol 11 000 homoj venis kaj festis kun arto,

muziko, dancado, kaj bongustaj manĝaĵoj, kaj 120 organizoj starigis informbudojn/tendojn por reklami kaj varbi por siaj fakoj.

Ni starigis tendon kaj ornamis ĝin per esperanta flago, kaj verdaj kaj blankaj paperaj floroj. Sur nia tablo

ni havis broŝurojn pri Esperanto, ekzemplojn de esperantaj libroj kaj ludoj, kaj grandan bovlon kun verdaj kaj blankaj dolĉaĵoj.

Dum la evento, ni parolis pri Esperanto kaj disdonis informojn al multaj homoj. Ni surpriziĝis pro kiom da homoj jam aŭdis pri Esperanto. Fakte, la unua vizitanto al nia tendo salutis nin esperante, dirante “Saluton!”

La foiro estis la unua komunuma evento en kiu ni partoprenis sed tamen ni konsideras nian partoprenon sukceso. Espereble ni semis verdajn semojn en la interesitajn homojn. Kelkaj homoj volonte donis al ni sian retpoŝt-adreson kaj ni sendos al ili mesaĝojn pri niaj renkontiĝoj. Ni ekscitiĝas pensi, kiu venos al nia venonta renkontiĝo.

Kolofono

La Nov-Jorkia Esperantisto raportas po du fojoj jare pri esperantaj eventoj kaj agadoj, kiuj okazas en la ŝtato Nov-Jorkio. Eldonas la gazeton la Esperanto-Societo de Sirakuso.

Redakcio

Timothy BORONCZYK
Zerbie HYNSON

Ne nepre kongruas la opinio de la societo kaj la enhavo de artikoloj. Sendu komentojn kaj proponojn retroŝte al la redakcia teamo ĉe novjorkio@syracuseesperanto.org.

Aktuala kaj malaktualaj numeroj estas haveblaj senpage ĉe syracuseesperanto.org/novjorkio.

La kolofona bildo de la unua paĝo montras la gorĝon de la rivero Genesee. La rivero fluas norden de la ŝtatlimo de Pensilvanio, tra okcidenta Nov-Jorkio, kaj en la lagon Ontarion. Survoje, ĝi tranĉas tiun gorĝon en la ŝtata parko Letchworth, proksimume 75 km for de Roĉestro.

Rekomenditaj Nomoj kaj Vortoj

Timoteo BORONCZYK, Esperanto-Societo de Sirakuso

Lokaj nomoj ne bezonas esti tradukitaj al Esperanto. Ekzemple, sufiĉas diri “Mi loĝas en Syracuse”. Sed ju pli ni plinombriĝas kaj ju pli aĝemaj ni fariĝas, des pli ni deziras paroli pri tiaj lokoj tute en Esperanto. Cetere, estas bona ke redakcio sekvu stilgvidon por subteni samecon kaj ĝustecon. Tial membroj de esperantaj grupoj en Nov-Jorkio kaj La Nov-Jorkia Esperantisto laboras kune pri listo de lokaj nomoj kaj gravaj vortoj.

La listo estas intencite mallonga kaj nekompleta. Ni ne celas esperantigi la nomon de ĉiu urbo, rivero, aŭ monto. Ĝin eblas plilongigi laŭ-bezone en la estonteco.

Jen aperas la listo por via intereso. Ni alprenas ĝin en stilgvidon, kiun ni preparas por La Nov-Jorkia Esperantisto, kaj planas fine publikigi la tutan stilgvidon.

montaro Adirondak – Adirondack Mountains, the Adirondacks

Akvotaŭno – Watertown

Albeno – Albany

montaro Apalaĉa – Appalachian Mountains, the Appalachians

Aŭburno – Auburn

Binghamtono – Binghamton

Broklino – Brooklyn

Bronkso – the Bronx

Bufalo – Buffalo

Fingraj Lagoj – Finger Lakes

lago Georgo – Lake George

Granda Foiro de Nov-Jorkio – Great New York State Fair

rivero Hudsono – Hudson River

Itako – Ithaca

Jonkerzo – Yonkers

montaro Katskil – Catskill Mountains, the Catskills

kantono – county

Kortlando – Cortland

Kvinzo – Queens

Longinsulo – Long Island

Manhatano – Manhattan

Metropola Nov-Jorkio – Downstate New York

Mohoka Valo – Mohawk Valley

Nemetropola Nov-Jorkio – Upstate New York

Niagara Akvofalaro – Niagara Falls

Norda-Suda Lago – North South Lake

Nov-Jorkio – New York (state)

Nov-Roĉelo – New Rochelle

Novjorko – New York (city)

Osvego – Oswego

Pen-Jorkia Valo – Penn-York Valley

Platsburgo – Plattsburgh

Roĉestro – Rochester

Romo – Rome

rivero Sankt-Laŭrenco – St Lawrence River

Saratogo – Saratoga

Silvero – Silver Bay

Sirakuso – Syracuse

Skenektado – Schenectady

Staten-Insulo – Staten Island

taŭno – town

Trojo – Troy

Utiko – Utica

urbegero – borough

Esperantistoj kaj Karuseloj en Paralela Universo

Kelly BUMAN, Binghamton Esperanto



Nov-Jorkiaj esperantistoj rajdis karuselojn por Paralela Universo. Malantaŭe, maldekstre dekstren: Timoteo BORONCZYK, Ben BARRERA, Zerbie HYNSON, Dana ALEXANDER, Kelly BUMAN, Rocío SANTOS-CARRILLO, Jonathan SAUNDERS, kaj Phyllis CLARK. Antaŭe, dekstre dekstren: Raúl J. GARCÍA, Annette BRASOR, Tomaso ALEXANDER, Ben STEVENS, Ken HYNSON, and Cory NEDLIK (foto de Kelly BUMAN).

Kvankam jam pasis kelkaj monatoj ekde Paralela Universo, nov-jorkiaj esperantistoj nepre ankoraŭ varme memoras la eventon. Ni renkontiĝis en Binghamtono por partopreni en tago organizita de Binghamton Esperanto plena je esperanta parolado kaj karuseloj.

Entreprenisto kaj ŝufaristo George JOHNSON donacis ses karuselojn al Binghamtono kaj ĝiaj najbaraj urboj. Nur 170 antikvaj karuseloj restas en Usono, do ĉi tiu kolekto gajnis por la urbo la nomon “la Ĉefurbo de Karuseloj”. Oni povas rajdi sur la karuseloj senpage, kaj ricevas specialan pinglon se oni rajdas sur ĉiuj. Tio estis nia celo, kiun ni sukcesis plenumi. Tamen, ni nur

devis rajdi sur kvin karuseloj ĉar la sesa estis riparata dum la okazaĵo.

La tago komenciĝis per matenmanĝo ĉe restoracio kiu servas multajn specojn de krespoj. Poste ni komencis nian karuselan operacon. La plej granda karuselo situas en Recreation-Parko en Binghamtono. En 2011 ĝi estis renovigita kaj memorigas Rod SERLING, la kreinto de la fama televida serio The Twilight Zone (SERLING kreskis en Binghamtono). La pentritaj tabuloj sur la karuselo prezentas scenojn de la plej konataj epizodoj, inkluzive de “Living Doll” kun Telly SAVALAS, “Time Enough at Last” kun Burgess MEREDITH, kaj “Nightmare at 20 000 Feet” kun William SHATNER. Tio

instigis viglan diskuton inter kelkaj partoprenantoj pri klasikaj televidaj serioj.

Post tri karuseloj ni tagmanĝis ĉe ĉina bufed-restoracio, kaj poste rajdis pli. Plejparte la karusel-bestoj estas belaj, ĉizitaj ĉevaloj. Tiu, sur kiu ni ne rajdis, estas apud bestoĝardeno do ĝi havas zebbron. Unu alia karuselo havas amuzan porkon kaj hundon.

Bedaŭrinde, kelkaj el la malpli grandaj karuseloj bezonis riparojn. Iliaj kaliopoj ne plu funkcias kaj oni ludas la muzikon per KD-ludilo dum la rajdantoj ĉirkaŭiras. Tiu stato igas min malĝoja, sed rajdi tamen estas tre amuze. Kaj ĉar la sesa karuselo nun estas riparita, mi esperas ke la aliaj estos baldaŭ riparitaj.

Je la tagfino, kelkaj esperantistoj iris por drinkaĵoj ĉe restoracio, kiu estas stiligita al la 1920aj jaroj kaj la tempo de Prohibicio - mi povus priskribi ĝin kiel “mojosa” se la stilo estus moderna! :-)

Entute 14 esperantistoj venis de Roĉestro, Sirakuso, Skanektado, kaj Novjorko por la evento. Ni gajnis la pinglojn, sed eble pli bone plenumis la celon de Paralela Universo: kunigi esperantistojn kaj realigi Esperantujon, se eĉ por nur unu tago.



Ĉu vi volas paroli Esperanton pli bone?

Tomaso ALEXANDER serĉas novajn lernantojn.

Lecionoj kun sperta instruisto estas efika kaj malmultekosta maniero plibonigi vian Esperanton kaj lerni vere paroli la lingvon.

italki.com/teacher/3188762?ref=3188762x

Notindaj Gratuloj

Zerbie HYNSON, Esperanto-Societo de Sirakuso

Ni gratulas al pluraj Esperantistoj de Nov-Jorkio pro ilia penado plibonigi sian regon de la lingvo kaj kontribui diversmaniere al la movado, inkluzive la jenajn:

Robin HILL, Max HOWLAND, kaj Jason REED de Novjorko, kiuj trapasis la KER-ekzamenon en junio. HILL kaj HOWLAND atingis la nivelon B2, REED atingis la nivelon B1.

Timoteo BORONCZYK de Sirakuso, kiu estis elektita al la estrarano de Esperanto-USA dum la Landa

Kongreso en Seatlo en julio. Li servas ĝis 2021.

Phyllis CLARK kaj Jonathan SAUNDERS de Skenektado, kiuj kunstarigis novan grupon en aŭgusto, la Mohawk-Hudson Esperanto Club. La grupo servas la ĉefurban regionon inkluzivanta Skenektadon, Albenon, kaj Trojon.

Klubo

Binghamton Esperanto

estro Kelly BUNMAN

facebook.com/groups/551200958567378

Mohawk-Hudson Esperanto Club

estroj Phyllis CLARK kaj Jonathan SAUNDERS
mhesperanto.org

Esperanto-Societo de Novjorko

estro Miko BRANDINI

esperanto-nyc.org

Esperanto-Asocio de Platsburgo

estro T. Roberto LYMAN

facebook.com/pburghesperanto

Esperanto-Klubo de Roĉestro

estro Tomaso ALEXANDER

groups.yahoo.com/EsperantoRochester

Esperanto-Societo de Sirakuso

estro Timoteo BORONCZYK

syracuseesperanto.org

Se ne estas grupo en via regiono, starigu iun kaj sciigu nin. Ni nepre listigos ĝin ĉi tie.

Kalendaro

Renkontiĝo de Binghamton Esperanto

okazas preskaŭ ĉiusemajne. Datoj estas anoncotaj.

facebook.com/groups/551200958567378

Komencanta konversacia renkontiĝo de la Esperanto-Societo de Novjorko

okazas foje. Datoj estas anoncotaj.

meetup.com/EsperantoSocietyOfNewYork

Formala renkontiĝo de la Esperanto-Societo de Novjorko

okazas ĉiumonate je la tria vendredo (krom somere).

meetup.com/EsperantoSocietyOfNewYork

Renkontiĝo de la Esperanto-Asocio de Platsburgo

okazas foje. Datoj estas anoncotaj.

facebook.com/pburghesperanto

Renkontiĝo de la Esperanto-Klubo de Roĉestro

okazas ĉiumonate je la dua vendredo.

events.duolingo.com/rochester-esperanto

Renkontiĝo de la Esperanto-Societo de Sirakuso

okazas ĉiumonate je la tria vendredon.

meetup.com/SyracuseEsperanto

Renkontiĝo de la Mohawk-Hudson

Esperanto Club okazas ĉiumonate je dua sabato.

meetup.com/Mohawk-Hudson-Esperanto-Club

Manĝado kaj Muzeumado

ekskurso al Metropola Muzeo de Arto en Novjorko okazos la 1an de decembro.

facebook.com/events/281571135816655

Zamenhof Tago okazos la 15an de decembro (kelkaj grupoj gastigos siajn proprajn festojn).

Esperanta Kurso okazos ĉe la Universitato de Roĉestro dum la venona semestro (de januaro ĝis majo).

esperanto.lodestone.org